ekzistus tia organizajo por igi la lingvon tuj uzebla kaj utile vivanta. Kiuj venas al esperanta kurso dum kelka tempo kaj ĝin forlasas neniam eĉ aŭdinte ke ekzistas jam okazoj uzi Esperanton, tiuj ŝajnas al mi preskaŭ trompitaj personoj. Ŝajnas al mi, ke la tutmonda rilatsistemo de U.E.A. estas afero eĉ pli urĝe instruinda al lernantoj ol la regulo pri **ju pli . . . des pli** aŭ la sufikso **ingo**.

Tre kulpan eraron do faris la aŭtoro de "Kursa Lernolibro" kaj li tie ĉi humile ĝin konfesas: tute mallaŭdinde

estis aludi al U.E.A. nur en la lasta ĉapitro de la libro. Jam en la Dekaj Leciono kaj de tiam ofte ĝis la fino de la libro li devas tion fari. Tion li memoru por aliaj eldonoj!

Jus aperis la nova Jarlibro de U. E.A. Ĝi estas vera enciklopedio de la internacia vivado kaj mirinda gvidlibro por vojaĝantoj. Ĉu vi ne deziras sperti, kiel efikas montro kaj klarigo de tiu poŝlibro al skeptikarideto pri nia afero? Provu, tia propagando donas riĉajn fruktojn.

## SUR NIA TABLO

"Will you walk into my parlor,  
Said the spider to the fly."

Nothing but good plain English will do justice to the matter to be discussed in this department for this month. Leaving aside Esperanto periodicals for one issue we will consider an article in one of our American publications which is to be found on every news-stand in the country and is as generally bought and as thoroughly read as any of our popular magazines.

POPULAR MECHANICS for May, on page 693, contains the following article:

"EUROPE FEELS THE NEED OF A WORLD LANGUAGE"

"In America we hear little of a world language and feel less the need of such than Europe where 20 nations back up into each others' yards, and not less than 27 languages are spoken, beside innumerable dialects and patois, the idioms of limited areas. The United States Consul at Berne, Switzerland, in a recent report, discusses the objects of the Association for the Creation of a Universal Language Bureau which has been founded for the avowed purpose of stimulating interest in an auxiliary language.

"It is not sought to drive out any existing language, but rather to introduce a tongue which may bring about an easier understanding among

all nations, especially for use in commerce.

"No propaganda is urged for any of the various international systems already established among which are systems bearing the names Bolak, Esperanto, Europal, Ido (reformed Esperanto), Latino sine flexione, Neutral (reformed neutral), Pankel, Perfect, Romanal, Tutonish, Viva and Volapuk.

"The immediate aim of the association is to induce the government of Switzerland to summon an international diplomatic conference to discuss the advisability of officially recognizing some international language. Should such negotiations be successful it is planned to have a commission examine existing systems of artificial languages, select the most suitable and lay down the lines for future development."

The forerunner of this article was an article in the "Daily Consular and Trade Report" for Jan. 7, 1914 entitled "Proposed Union for an International Language" and was written by the American Consul at Berne. This article is too long to quote but merits careful reading by every Esperantist. It sets forth the need of an auxiliary language and ends with a paragraph under this black-face heading: **Ido or Reformed Esperanto** and contains the following resolution made by this self-constituted committee: "None of the



existing systems can be accepted in its entirety and without alteration as an international language. The committee resolves to accept Esperanto in principle, in view of its relative perfection and of numerous and varied uses to which it has already been put, but with certain alterations to be made by a permanent committee in accordance with the conclusions of the report of the secretaries and the project of Ido, by agreement with the committee of the Esperantists." Here follows this humorous statement: "The Esperantists, however, declined this proposal and the entire matter was then intrusted to the Union for the International language (interested in propaganda for Ido, and not to be confused with the Association for the Creation of a Universal Language Bureau previously described)."

Earlier in the report our honorable consul naively remarks: "At the Esperanto Congress held at Berne, Switzerland, the supporters of Ido were not permitted to defend their views, so they held separate meetings. Ido is the result of examinations made by a committee elected in 1907 by a society called the Delegation for the Adoption of an Auxiliary Language, founded in 1901, which received the support of numerous societies of all countries and of many hundred members of academies, colleges, and universities. This committee passed resolutions on October 24, 1907, among which may be mentioned the following:" The "following" is the resolution quoted above.

Abraham Lincoln's famous remark that "You can fool some of the people all of the time, and all of the people some of the time, but you can't fool all the people all of the time" applies very aptly to this present situation. The Delegacio did fool some of the Esperantists, some of the academies, some of the universities, but a greater portion of these men repudiated the action of the Delegacio, as quoted from Oficiala Gazeto in a recent issue of this magazine.

Those of us who were Esperantists during the infamous acts of the Delegacio will see in the present project a renewed attempt to discredit Esperanto and to substitute for it a phantom which has always been a phantom, never having really existed in the true sense of the word. A warning is given to the younger esperan-

tists who may see in this project an opportunity to advance the interests of Esperanto. To such we would counsel a careful reading of the "Historio kaj Teorio de Ido" and the reports in the Oficiala Gazeto.

With the splendid organization of Esperanto propaganda societies, all over Europe; with the widespread services of U.E.A. which for the past five years has shown the practical advantages of Esperanto, the activities of our Consul can be classed as nothing but an insult to the thousands of Esperantists throughout the entire world. There is an international language; it has existed successfully for more than twenty-five years; what it has done and what it stands for every reader of this magazine well knows. Success is bound to produce imitators, and seekers after notoriety will for all time be bringing forward some new and "improved" international language. These are harmless, but there is danger to the progress of Esperanto in the persistent, although apparently futile attempts of the Idists to kill Esperanto without offering any practical substitute. While they are few in number they are persistent and are evidently backed by interests willing to pay a good price for the destruction of Esperanto.

We have pursued a course of "watchful waiting" for many years, now let us get to work and uncover the "cat-in-the-meal" behind the Iconoclasts. The ultimate revelation will make interesting history. When such important publications as the two mentioned can be innocently led into promoting so base an attempt it is high time that the whole truth should be known and further betrayal of the public press made impossible.

In refreshing contrast is the following resolution submitted to the House of Representatives on Feb. 28, 1914, by the Hon. Richard Bartholdt of Missouri.

63d Congress, 2d Session  
H. RES. 415  
IN THE HOUSE OF  
REPRESENTATIVES  
February 14, 1914

Mr. Bartholdt submitted the following resolution; which was referred to the Committee on Education and ordered to be printed.

#### RESOLUTION

**Resolved,** That the study of Esperanto as an auxiliary language and a



means of facilitating the social and commercial intercourse of the people of the United States and those of

other countries shall be made a part of the regular course of study in the public schools of the District of Columbia.

## OFFICIAL COMMUNICATIONS

### THE CHICAGO CONGRESS

Reference to another part of the magazine will give some idea of the plans which have been made for a successful and enjoyable week in Chicago. Months ago the committee in charge of the work was organized and it has worked most energetically from that time, until now, more than two months before the date of the congress, all plans have been carefully considered and worked out. Never in the history of Esperanto in Usono has there been so good an opportunity to promote our interests as will be furnished by the congress of 1914, not even at the Sixth International Congress in Washington. A very enjoyable entertainment program has been made up and ample time has been left for the more serious business. If the ultimate result is not a boom for Esperanto it will not be the fault of those who have been in charge of the arrangements.

In order to carry to a successful issue the program as outlined it is necessary that the members of the Association lend their immediate and hearty support. A considerable financial responsibility has been assumed by the various committees and we should not allow them to bear the financial burden alone, in addition to the great amount of time and thought which they are giving to the preparations. Three ways are provided for financial help and each should choose according to his means. First, the guaranty fund which is fully explained and to which already a number have responded; second, the full congress ticket, which as near as we can figure is giving about two dollars' value for one; third, the EANA membership card which admits to executive sessions of the Congress but does not include the various excursions and entertainments.

Let every Esperantist in the country who can possibly arrange his

plans to do so reserve the third week in July for a trip to Chicago and let him show his encouragement to the faithful and hard-working committee by buying his ticket NOW. There will be many of us who will not be able to be present but who will be glad to aid by the purchase of a guaranty share or a ticket. Each Esperantist will see the importance of a prompt response.

The committees in charge have done their duty faithfully, tirelessly and well. The failure or success of their work now depends entirely upon the support of the Esperantists. It is not to be believed for a minute that we shall allow these months of labor to go for failure or a half-hearted support. It is within our power to give an object lesson to the non-esperantists, in the very heart of our great country. The success or failure of the 1914 congress will be heralded from one end of this broad land to the other. It **must** be a success!

Between the issue of this magazine and the first of June five hundred tickets should be sold. Send for yours TODAY!

### STUDENTS' ESPERANTO LEAGUE

The coming summer promises to be a busy and prosperous one for the Students' Esperanto League. In cooperation with the E. A. N. A. Propaganda Director an extensive campaign has been started among the secondary schools of the country. Esperanto literature together with a personal letter is being sent to scores of high school principals. We aim both to interest the school authorities and to secure leaders in each school to represent the S. E. L.

In several schools "rondoj" will organize this spring, the members planning to study the language during vacation, and continuing in the fall.



as a **conversational** and **social** club. This plan will no doubt make Esperanto study more interesting and will take less time from the school work.

Students who desire the services of our circulating library or of the Bureaus of Correspondence and Instruction, and who wish to become a member of an active student organization are urged to write the secretary for information regarding membership in both S.E.L. and E.A.N.A.

Several copies of our Year-Book are yet on hand which are sent free to members and to others for ten cents. Address:

Clyde Kennedy, Secretary S.E.L.,  
Far, West Virginia.

### NEW ENGLAND ESPERANTO ASSOCIATION

#### Dr. Samuel Henry Sparhawk

Word has just been received of the sudden death of Dr. Sparhawk on March 3rd, in the seventy-third year of his age, at St. Johnsbury, Vermont.

After honorable discharge from service in the Civil War he returned to Vermont where he took up the study of medicine with his brother, later graduating from the Homeopathic College in Cleveland, Ohio. Since that time he has continued active practice in his native State, having been located in St. Johnsbury since 1880.

Devoted to his profession he was known and loved by a large number of his fellow townsmen. Aside from his professional work he was alive to many interests, among other things being an enthusiastic agriculturist. Several years ago he took up the study of Esperanto and gave to it the whole-hearted energy of his nature, becoming surprisingly proficient for a man who was well into the evening of life and who was remote from the large body of his samideanoj. He was a loyal supporter of the Association and did much to spread a knowledge of the language among his friends and neighbors.

Thanks to Esperanto the writer enjoyed a frequent and enjoyable correspondence with Dr. Sparhawk, extending over several years, and although never having met him personally was in close touch with him

concerning affairs relating to their mutual profession, mutual interest in the garden, and common devotion to the cause of Esperanto, and feels keenly the loss of a valued friend.

The sympathy of the New England Esperanto Association is extended to the widow and son who survive him.

C. H. Fessenden, M. D.,  
Secretary.

#### U. E. A.

The 1914 Yearbook of the Universal Esperanto Association has just appeared, and members of the UEA are rejoicing over the valuable compendium of Esperanto data placed in their hands. Nothing else can so well prove the immense popularity which this association has attained in its six years of existence, and there is more convincing propaganda material in its 336 finely printed pages than in a three-hour lecture. The flexibly-bound, round-cornered volume is, despite its number of pages, convenient for the coat pocket. Here is a partial list of contents:

Directory of the 1635 agents of the UEA (Delegates, Vice- and Sub-Delegates, Esperanto Offices, etc.).

Directory of the 465 Esperanto societies, and non-esperantist firms and organizations now affiliated with the UEA.

Gazeteer of the European and North American lands, giving up-to-date information as to size, population, languages, religions, government, army and navy, education, coinage, systems of weights and measures, economics, postal, telegraph, telephone and railway systems, navigation, tourist movement, etc.

Hotel Directory, with a list of 625 hotels and restaurants, recommended by the UEA. At many of these hotels Esperanto is spoken.

Folding map of Europe, showing the cities represented by the UEA.

Comparative tables of the world's different money systems, calendars, weights and measures; tables of time and tide; calendars of the International and important national conventions during 1914.

Historical information relative to the Esperanto movement, etc.



Every Esperantist should have this invaluable reference volume. It is not sold, but is sent free to members of the UEA. Membership costs but Fifty cents a year, and at the same time entitles one to use free of charge, the vast and well organized service of the UEA.

If there is no "Delegate" in your city, send your dues direct to Mr. D. E. Parrish, 4525 Moneta Ave., Los Angeles, Cal., and request appointment as UEA agent for your community.

There are now 135 cities in Usono represented by Delegates, but Great Britain, only 3-4 the size of California, has more, Germany has 185 Delegates, and France over 200. In order to take the lead in the next edition of the Yearbook, we must have over 200 Delegates before 1915, the Expo-

sition year.

N. B. Membership in the E. A. of N. A. is required of all Delegates in Usono.

### HELP!

Henryetta, Okla., 4-2-'14.

Esperantistoj:

Oklahoma has 7 known Esperantists.

Condolences and advice from experienced Samideanoj earnestly requested.

Forward your comments to the undersigned. All available material to be used in building an organization in Oklahoma.

R. E. Dooley,  
Henryetta, Okla.

Member E. A. N. A.

### END OF OFFICIAL PART

### MAJO

de C. C. Camp

Kio belas kiel Majo?  
Tiam regas ĝoj' kaj gajo;  
Jam formortis frost-vetero,  
Kaj salutas nin Somero.

Ĉio estas jam feliĉa;  
La Natur' per verdo riĉa  
Sin revestas, kaj ornamas  
Sin per floroj; ĉio amas.

Mokobirdoj dolĉe kantas,  
La kampionist' maizon plantas,  
Fiŝ-kaptistoj fiŝojn hokas,  
Birdoj nestas, ranoj vokas.

Hele bluas la ĉielo  
Kaj briletas nokte steloj;  
Kelkafoje pluvas varme,  
Poste birdoj ĉirpas ĉarme.

Goje la fluet' murmuras,  
Pri l' feliĉ' la vent' susuras;  
Pri la am' parolas ĉio,  
Memorigas nin pri Dio.

Tre diversas la koloroj  
De l' verdajoj, kaj odoroj  
Floraj dolĉe sin varias:  
Ĉio ŝajne harmonias.

El la etaj vintraj ĉeloj  
Jam elrompis la abeloj;  
Ili nun sen ĉes' laboras  
Kie ajn kreskajoj floras.

En labor' formikoj ĝojas;  
La sciur' sur arbo bojas;  
Araneoj retojn ŝpinas;  
Ĉevalin' al ido klinas.

Nud-piedaj geknabetoj  
Ludas per piedfingretoj;  
Ĝojas ĉiu ĉe l' ekveno  
De manĝaĵoj el ĝardeno.

Klukanton la kovaj' ĉirkaŭas;  
Time la katid' miaŭas;  
Preskaŭ ĉiu besto blekas,  
De amat' respondon vekas.

Meze l' Majaj gaj' kaj ĝojo  
Tre facilas nia vojo;  
Ĉar ĝi klare sin malkaŝas  
Pli malofte ni fal-paŝas.

Post Vekig' pro Dia graco  
Etern-vivos ni en paco,  
Kaj la Maja hela belo  
Estas bildo de l' Ĉielo.



## NELLA

aŭ

## La Vojo Nekonata

Originala Novelo de Edmond Privat

## Ĉapitro IX

Unuflanke ŝatis Nella sian novan solecon, ĉar samtempe ĝi ebligis ŝin vivadi tute senĝene kun ŝia doloro kaj intimaj pensoj dum ĝi tamen ne plene ŝin apartigis de la mondo. Tiu konstanta voĉa komunikado kun la homoj iel kontentigis en ŝi parton de la ĝenerala societema bezono, kiu kuŝas en ni ĉiuj. En la komunan vivon ŝi intervenis, sed ŝia persono kaj ŝia trezoro de sufero restis kaŝataj kaj respektataj.

Aliflanke tre malfacile estis elporti tian solecon post jaroj de viglaj amikecoj, post tempo de amo ĝojplena. La koro restis nepre malsata.

La poetojn kaj pensulojn ŝi legis nun fervore kaj tra ŝia propra doloro komprenis ilin tiel nove kaj pli profunde, ke ŝi mirinde riĉigis sian animon. Sed tiu riĉeco tamen ne satigis ŝin.

Vane ŝi klopodis konstrui al si laŭ la revoj de Alfred de Vigny tiun fiernoblan personecon, kiu malinteresiĝas je la sorto de l' mondo, adoras la puran penson kaj de alte malŝatas ĉiun homaman agadon, "ĉar ĝi riskas ĉiam esti ĉu senutila, ĉu pli ofte malutila."

Sian fervoran animon ne satigis tia mandarena skeptikeco. Al ŝia soifanta koro ne sufiĉis la maŝina ĉiutaga laborado kaj la soleca pensado, ne sufiĉis penadi kaj suferi por si mem. Por la ceteraj ŝi volus vivi kaj sindoni.

Legante la gazetojn neniam antaŭe kiel nun ŝi sentis en si tiom da simpatio por ĉiuj suferantoj, por ĉiuj viktimoj de iu ajn maljusteco aŭ subpremo.

Kiom ofte ŝi bedaŭris, ke ŝi ne pli faris por la ceteraj dum ŝi estis ankoraŭ bela, feliĉa kaj libera. Kial ŝi ne pli malegoiste profitigis sian brilan junecon? Sajnas al ŝi kvazaŭ nur kruela sufero profunde komprenigas la signifon de l' vivo.

Jam ofte ŝi sukcesis danke kaj pli kviete repensi pri la granda ĝojo kaj la granda doloro de amo. De la unua eĉ unu minuto valorigas tutan vivon kaj la dua ĝin eterne sanktigas. Tiu kredo de alia amata poeto fariĝis jam

la ŝia kaj inter la momentoj de akra turmento kaj bedaŭro tre dolĉe kaj pacige ŝin influis tiu penso, ke sanktan rolon donis al ŝi la honoro de tiel forta homa ĉagreno. Sed ne longe daŭris la paco en koro, ĉar vere kion ŝi povus ja fari?

Kun grandiganta entuziasmo ŝi sekvadis la progreson de l' movado por liberigo de sia sekso. Jam pli ol admiro plenigis ŝin por tiuj bravaj virinoj, kiuj kuraĝe batalas por ebligi ke patrinoj kaj laboristinoj havu leĝan rimedon por protekti siajn infanojn, siajn hejmojn aŭ siajn kunfratinojn kontraŭ la maljustaj oficialigitaj de nurvira regado. Kiel fervore ŝi legis la novaĵojn de la movado kaj sekvis la maldolĉan progresadon de l' milito. Kiom ofte ŝi deziris ankaŭ partopreni manifestaciojn, mem agi kaj suferi por la afero. Sed, ho ve, la spegulo ŝin memorigis, ke ne estas eble: ŝi povus nur esti malutila. Kvankam tiu mem kondamno al flankerestado ŝin korvundis, ŝi tre klare komprenis mem, ke neniel oni devas doni al la malbonvolaj homoj kaŭzon ekpensi aŭ ekkrii, ke tio nur estas movado de malbelaj fraŭlinoj kaj malkontentulinoj. Da tiaj antaŭjuĝoj jam ekzistis tro multe!

Bone kaj saĝe estis, ke la militantinoj de la movado daŭrigu esti ĉarmaj kaj feliĉaj virinoj, al kiuj la vivo milde ridetis, ĉar tiam ilia sindono kaj suferado por la celo pli potence impresas la nacion. Vere estis, ke ŝi nur estus humila soldatino en tre vasta armeo, kaj estus apenaŭ rimarkota. Tamen ŝi sentis ke ŝia devo estas nepre rifuzi al si mem tiun ĝojon kaj honoron kaj limigi sian rolon al silenta kaj kaŝita oferado ĉiutage kaj ŝparado de moneretoj por sendi al la Ligaj fondo.

Kiel enviindaj estis la plenliberaj graciaj junulinoj, kiuj povis vivi en la varmiga rondo de l' agado!

Pasis la tagoj, pasis la monatoj, baldaŭ pasos la jaroj kaj ŝi daŭrigis vivadi solece en silento. Ŝi ne povis sin konvinki, ke sola celo de ŝia vivo estos ĉiam nur rapidigi la telefonan komunikadon de komizoj kaj komer-



cantoj. Sendube tio estas ja parto de l' tutmonda utilo, sed koro kiel ŝia postulis pli vastan, pli varman kampon. Se ŝi nur estus seninstrua kaj malsaĝa, ŝi suferus malpli akre. Bedaŭrinde io ŝin incitis ĉie trovi kaŭzojn por nobla flamiĝo kaj indigno, sed la sola rezultato ĉiam estis ke poste ŝin pli akre dolorigis ŝia terura mallibereco kaj deviga nepartopreno.

Iom post iom enpenetris ŝin la danĝera dubo, ĉu estas tasko por ŝi en la mondo. Nella komencis pense riproĉi la doktoron, ke li diris al ŝi trompajn vortojn de kuraĝo. Kial li iam esperigis al ŝi iluzian rolon?

Tiajn viktimojn de l' vivado la naturo mem forjetas flanken. Kial do vivi estante nur nenormala troa kreitaĵo? Tion ĉi ĵus pensis Nella unu tagon tagmeze dum la tagmanĝa fermtempo de l' oficejo. Tre ofte ŝi tiam restis en sia "kajuto" kaj, manĝinte sandviĉon kaj bananon, povis ĝui plenan horon de kvieto seninterrompa legado. Si apenaŭ kuraĝis legi tiun tagon, tamen ŝi rimarkis artikoleon pri lingvo internacia kaj decidis, ke ŝi aĉetos lernolibron de Esperanto por vidi ĉu la lingvo estas vere facile lernebla. Eble tia studo ŝin distrus. (Daŭrigota)

Edzino—Johano, la nova servistino diras ke vi hieraŭ matene penis kisi ŝin.

Johano—Kio! Kaj mi donis dolaron al ŝi por diri nenion al vi pri tio. Tuj forsendu ŝin. Tian personon oni ne povas konfidi.

—Idea.

## KIEL MI MORTPAFIS URSON

de Charles W. Warner

**O**NI tiel diversmaniere rakontas pri mia hazarda renkonto kun Adirondak'a urso, dum la ĵus pasinta somero, ke, pro justeco al la publiko, al mi mem, kaj al la urso, estas necese ke mi klare konigu pri la faktoj. Krome, mi tiom malofte trovas okazon mortpafi urson, ke oni povos pardoni al mi la famigadon de la afero.

La renkonto estis tute senintenca, ambaŭflanke. Mi ne ĉasis la urson, kaj mi ne havas ian kaŭzon kredi ke la urso ĉasis min. La vero estas, ke ni ambaŭ serĉis rubusojn, kaj tute ŝance renkontis,—kiel estas kutime. La vizitantoj ĉe la Adirondak'oj ĉiam multe interparolas pri ursoj,—ĝenerala deziresprimo ke oni vidu urson en la arbaro, kaj multe da konjektado pri kiamaniere oni sin kondukus, se li, aŭ ŝi renkontus ĝin. Sed, ursoj estas malmultenombraj, kaj timemaj, kaj aperas nur antaŭ la favorita malmulto.

Estis varma tago dum Aŭgusto, precize tia tago kiam iaspeca aven-

turo ŝajnas neebla. Sed, la dommastrinoj de nia dometo,—ili estis kvar,—decidis sendi min al la senarbejo, sur la monto, malantaŭ la domo, por kolekti rubusojn. Tie, estis pliprecize, serio da senarbejoj, etendantaj supren en la arbaron, elkovritaj de arbetoj, dornujoj, kaj ne neromantikaj. Bovinoj tie sin paŝtis, kaj penetris tra la foliecaj vojetoj, de unu al alia senarbejo, kaj sin nutris per la branĉetoj. Oni kompleze donis al mi ses-litran sitelon, kaj diris al mi ke mi ne longe forestu.

Ne pro ia rabema instinkto, sed por ŝajnaĵo, mi portis pafilon. Aldonas al la vireca aspekto de persono kun stana sitelo se li ankaŭ portas pafilon. Estis eble, ke mi povos flugigi perdrikon; tamen, kiamaniere mi povos trafi ĝin, se ĝi ekflugos anstataŭ stari senmove, mi tute ne sciis. Multaj personoj uzas pafilon kontraŭ perdrikojn. Mi preferas kuglopafilon: tio faras bonordan aferon el mortigo, kaj ne antaŭtempe remburas la birdon



per plumbaj globetoj. La kuglopafilo estis el la fabrikejo de "Sharp," kaj portis kuglo-kartoĉon (dek en la funto),—bonega ilo, la proprajo de amiko mia, kiu intencis de antaŭ multaj jaroj, mortigi cervon per ĝi. Li povis trafi arbon per ĝi—se la vento ne blovas, kaj la atmosfero estas tute taŭga, kaj la arbo ne estas tro malproksima — preskaŭ je ĉiu provo. Kompreneble, la arbo devas havi iom da amplekso. Ne estas necese diri ke je tiu tempo mi ne estas ia ĉasisto. Antaŭ jaroj mi estis mortiginta rube-kolon, kun pli humiligaj cirkonstancoj. La birdo estis sur malalta ĉerizarbo. Mi ŝargis grandan pafilon, iom plene, rampis sub la arbon, apogis la pafilon sur barilon, ĝia fino pli ol dek futoj malproksime de la birdo, fermis la ambaŭ okulojn, kaj tiris la tirilon. Kiam mi leviĝis, por esplori pri kio okazis, la rubekolo estas dispecigita en pli ol milo da pecetoj, neniuj el kiuj estis sufiĉe granda por ebligi al naturisto konstati de ĝi, al kia speco ĝi apartenas. Tio naŭzis min, rilate la vivon de ĉasisto. Mi mencias la okazintajn por montri, ke, kvankam mi iris kolekti rubusojn armita, ne estas granda neegaleco inter mi kaj la urso.

En ĉi tiu rubusejo oni estis vidinta ursojn. La ĵus pasintan someron nia nigrula kuiristino, akompanata de najbara knabineto, estis kolektanta rubusojn tie, unu tagon, kiam urso elvenis el la arbaro kaj alpaŝis al ili. La knabineto forkuris, kaj evitis danĝeron. Onklino "Chloe" (kloj) estis paralizata de teruro. Anstataŭ ekforkuri, ŝi sidiĝis sur la tero kie ŝi estis starinta, kaj ekploris, kaj ekkriegis, fordonante sin al nepra perdo. La urso estis konfuzata de tia konduto. Ĝi alproksimiĝis kaj rigardadis ŝin; ĝi ĉirkaŭ promenadis kaj elstudis ŝin. Kredeble, ĝi neniam estis vidinta nigrulon kaj ne scias ĉu ŝi estos manĝebla; iaokaze, ĝi sin turnis kaj iris en la arbaron. Ĉi tiu estas aŭtentika ek-

zemplo de la ĝentila konsideremo de urso, kaj estas multe pli rimarkinda ol la toleremo de la famekonita leono, rilate la afrikan sklavon, ĉar la urso ne havis dornon en sia piedo.

Kiam mi estis suprenrampinta la monteton, mi metis mian kuglopafilon kontraŭ arbon, kaj komencis kolekti rubusojn, allogate de arbeto al arbeto per la nigra brilo de la frukto (kiu ĉiam promesas pli multon je distanco ol ĝi plenumas kiam vi atingas ĝin); enpenetris pli kaj pli antaŭen, tra la de folioj ombritaj bovin-vojetoj, makulitaj de sunbriloj, en senarbejon post senarbejo. Je ĉiu flanko mi povis aŭdi la tintadon de sonoriletoj, la kraketadon de branĉetoj, kaj la piedbatadon de bovaro, kiu trovis kontraŭ la muŝoj rifuĝejon en la densaĵo. Foje, kiam mi trapenetris densaĵon, mi renkontis dolĉan bovinon, kiu fikse rigardis min dum sekundo, kaj tiam iris en la arbitaĵon. Mi al kutimiĝis al ĉi tiu muta kuneco, kaj kolektadis silente, atribuanta la ĉian bruon al la bestaro, tute ne pensante pri vera urso. Fakte, tamen, la tutan tempon mi pensadis pri romantika urso, kaj, kolektante, mi elpensis rakonton pri kompleza ursino, kiu perdinte sian idon, ekkaptis knabineton en ĉi tiu sama arbaro, forportis ŝin ameme al kavajo, kaj nutris ŝin per ursolakto kaj mielo. Kiam la knabino estis sufiĉe granda por forkuri, influita de siaj hereditaj instinktoj, ŝi elŝtelis, kaj venis en la valon al la patra domo (ĉi tiu parto de la rakonto estis tiel elaborota, ke la infano rekonos sian patron pro iu familia similaĵo, kaj havos ian lingvon per kio ŝi povos alparoli lin) kaj rakontis al li pri kie loĝas la urso. La patro prenis la pafilon, kaj gvidata de la senkompata filino, iris en la arbaron kaj pafmortis la urson, kiu faris nenian kontraŭstaron, kaj nur mortante, turnis reciproĉemajn okulojn je sia mortiganto. La moralo de ĉi tiu rakonto



estos gentileco al bestoj.

Mi estis meze de tiu rakonto, kiam mi ekrigardis kelkajn metrojn for, apud la malproksima rando de la senarbejo, kaj tie estis urso! Ĝi estis staranta sur siaj malantaŭaj piedoj, faranta precize tion, kion mi estis faronta,—kolektante rubusojn. Per unu piedego ĝi klinigis la arbeton, kaj per la alia ĝi skrapis la rubusojn en sian buŝegon,—ĉu maturajn, ĉu nematurajn. Dirante ke mi estis surprizata, tute ne trafis la celon. Mi subite eltrovis ke mi tute ne deziras vidi urson. Preskaŭ sammomente la urso ekvidis min, ĉesis manĝi rubusojn, kaj rigardadis min per ĝoja surprizo. Estas tre facile imagi kion oni faros en tiaj cirkonstancoj; eble oni ne tion faros: Mi ne tion faris. La urso mallevis siajn antaŭajn piedojn kaj alpaŝis al mi.

Ne estas utile suprengrimpi arbon, havante tian bonegan grimpiston poste. Se mi ekkurus mi havis nenian dubon ke la urso postkuros min; kaj kvankam urso ne povas malsuprenkuri monteton, tiel rapide kiel ĝi povas ĝin suprenkuri, tamen, mi sentis ke ĝi povos pli rapide trapasi tiun malglatan, kovritan de arbetaĵo teron ol mi povos.

La urso alproksimiĝis. Subite mi ekpensis pri kiamaniere mi povos distri ĝian menson, ĝis mi povos returnen marŝi al mia milita provizo. Mia sitelo estas preskaŭ plenplena je bonegaj rubusoj,—multe pli bonegaj ol tiuj, kiujn la urso povos mem kolekti. Mi metis la sitelon surtere, kaj malrapide posteniris, fiksante mian okulon, kiel bestodrasisto, sur la urso. La ruzo sukcesis.

La besto atingis la rubusojn, kaj haltis. Nekutimite manĝi el sitelo, ĝi renversis ĝin, nazumis inter la frukto, "manĝegante" (se estas tia vorto) ĝin, miksita kun folioj kaj teraĵo, kiel porko. La urso estas pli malĝentila manĝanto ol la porko. Kiam ajn ĝi

vizitas printempe la acersukeran kabanon, ĝi ĉiam renversas la sitelojn da siropo, kaj piedumas inter la glueca dolĉaĵo, malŝparante pli multe ol ĝi manĝadas. La maniero de la urso estas tute malagrabra.

Tuj kiam mia malamiko malsuprenigis sian kapon, mi ekkuris. Iom senspira, kaj tremanta, mi atingis mian fidelan kuglo-pafilon. Estis tute ne tro frue. Mi povis aŭdi la urson, kraketantan tra la arbetaĵo, post mi. Kolera pro mia trompemo, li alproksimiĝis. Mi sentis ke la vivtempo de unu el ni estas mallonga. La rapidecon de penso, je tia tempo, oni bone scias. Mi pensis oktavan volumon, ilustrigis ĝin, eldonigis ĝin, vendis kvindek milojn da ekzempleroj, kaj iris al Eŭropo je la profito, dum la urso estis trotanta trans la senarbetaĵon. Dum mi pretigis la pafilon mi rapide kaj nekontente rigardis mian tutan vivon. Mi notis, ke eĉ per tia deviga resumo, estas preskaŭ neeble rememori ion bonan, kion oni estas farinta. La pekoj elstaras neordinare klaraj. Mi rememoris jurnalan abonon, kies pagon mi estis prokrastita jaron post jaro, ĝis kaj redaktoro, kaj jurnalo estis mortintaj, kaj nun, neniam povas esti pagita, dum la tuta eterne.

La urso ankoraŭ alproksimiĝis.

Mi provis rememori tion, kion mi legis pri renkontoj kun ursoj. Mi ne povis rekoni iun okazon kiam viro forkuris de urso en la arbaro, kaj restis sendifekte, kvankam mi povis rememori sufiĉajn okazojn kiam la urso sukcese forkuris. Mi provis pripensi la plej bonan rimedon por mortigi urson, kiam oni ne estas sufiĉe proksime por bategi ĝin sur la kapo per la pafiltenilo. Mia unua penso estis ke mi pafu je ĝia kapo; meti la kuglon inter ĝiaj okuloj; sed tio estas danĝera eksperimento. La cerbo de la urso estas tre malgranda; kaj se oni ne trafas tion, la urso ne ĝenas



pro kuglo en la kapo; tio estas, ne tuj. Mi rememoris ke tuja morto de la urso sekvos la plantadon de kuglo ĵus post ĝia antaŭa kruro, kaj sendita en ĝian koron. Tiu punkto estas ankaŭ malfacile trafota, se la urso ne staras kun la flanko kontraŭ vi, kiel celtabulo. Mi fine decidis pafi al ĝi laŭhazarde.

La urso ankoraŭ alproksimiĝis.

La konkurso ŝajnis al mi tre malsimila al io ĉe Creedmore (bonekonata loko por pafkonkursoj). Mi estis zorge leganta la raportojn de la tiea pafado; sed ne estas facile apliki la sperton, tiamaniere akiritan. Mi dubis ĉu estus pli bone ke mi pafu, kuŝante sur la stomako; ĉu sur la dorso, subtenante la pafilon per la piedfingroj. Sed en neniu el tiuj pozicioj, mi pripensis, mi povos vidi la urson, ĝis ĝi estos super mi. La distanco estas tro mallonga kaj la urso ne atendos dum mi ekzamenos la termometron kaj notos la direkton de la vento. Provo de la Creedmor'a metodo, tial, devis esti forlasata; kaj mi forte bedaŭris ke mi ne estas leginta pli multajn raportojn pri senprepara pafado.

Ĉar la urso alproksimiĝis.

Mi provis fiksi miajn lastajn pensojn je mia familio. Ĉar mia familio estas malgranda, tio ne estis malfacila. Timo ke mi ofendos mian edzinon, aŭ vundos ŝiajn sentojn, regis en mia menso. Kiel ŝi maltrankviliĝos, kiam horo post horo pasiĝadas, kaj mi ne revenos! Kion opinios la ceteraj el la domuloj, kiam pasiĝis la posttagmezo kaj alvenos neniam rubusoj! Kia estos la ĉagreno de mia edzino, kiam oni portas al ŝi la informon ke ŝia edzo estas manĝita de urso! Mi ne povas imagi ion pli humiligan, ol havi edzon, kiu estas manĝita de urso. Kaj tio ne estis mia sola maltrankvilo. Je tiaj tempoj, oni ne povas kontroli la menson. Meze de plej

gravaj danĝeroj, okazas la plej kapricaj ideoj. Mi rigardis preter la plorantaj amikoj, kaj pripensis pri kian epitafon oni devos skribigi sur mian tombŝtonon. Ion, iom jene:—

Ĉi Tie Kuŝas la Restajo  
DE

Manĝita de Urso

Aug. 20, 1877

Ĝi estas tre neheroa, kaj eĉ malagraba epitafo. Tiu "manĝita de urso" estas netolerebla. Ĝi estas groteska. Kaj tiam mi pensis "Kiel tia lingvo ne taŭgas al kompakta esprimo." Ne estus dece, skribi sur la ŝtonon nur "manĝita;" ĉar tio estus nedifinita, kaj postulus klarigon; devus signifi manĝita de kanibalo. Ĉi tiu malfacilaĵo ne povas okazi en la germana lingvo, en kiu *essen* signifas manĝado de homo, kaj *fressen*, de besto. Kiel simpla estus la afero germane:—

HIER LIEGT  
HOCHWOHLGEBOREN  
HERR

GEFRESSEN

Aug. 20, 1877

Tio, klarigas sin. La altrangnaskitulo estas manĝita de besto, kaj kredeble de urso,—besto kiu havas malbonan reputacion, de la tagoj de Elisha.

La urso ankoraŭ alproksimiĝis; fakte, ĝi jam alvenis. Mi supozis ke ĝi povas vidi la blankon de miaj okuloj. Miaj ĉiuj postaj pripensoj estis kunfuzaj. Mi levis la pafilon, celis la urson je ĝia brusto, kaj pafis. Tiam mi turnis min, kaj kuris kiel cervo. Mi ne aŭdis la urson sekvanta. Mi rigardis posten. La urso estis haltinta. Ĝi estis kuŝanta. Mi tiam rememoris ke la pli bona agado, post kiam oni pafis pafilon, estas ĝin reŝargi. Tion mi faris, fiksante la okulojn je la urso. Li eĉ ne ekmovis. Mi marŝis reen, suspekteme. Estis tremeto en ĝiaj malantaŭaj kruroj, sed



nenia alia movado. Tamen, eble ĝi ŝajnis; ursoj ofte ŝajnigas. Por esti certa, mi alproksimiĝis kaj pafis kuglon en ĝian kapon. Tio nun ne ĝenis ĝin; nenio ĝenis ĝin. La morto estis veninta al ĝi per kompatema subiteco. Ĝi estis trankvila en morto. Por ke ĝi tiel restu, mi dispafis ĝian cerbon, kaj tiam ekiris hejmen. Mi estis mortiginta urson!

Malgraŭ mia ekscito, mi povis senzorge marŝi en la domon, kun indifera mieno. Estis ĥoro da voĉoj:—

“Kie estas viaj rubusoj?”

“Kial vi tiom longe restis for?”

“Kie estas via sitelo?”

“Mi postlasis la sitelon.”

“Postlasis la sitelon! Pro kio?”

“Urso deziris ĝin.”

“Ho friponaĵo!”

“Nu, kiam mi lastatempe vidis ĝin, urso havis ĝin.”

“Ho ĉesu, vi ne ja vidis urson?”

“Jes, mi ja vidis urson.”

“Ĉu ĝi kuradis?”

“Jes, ĝi kuradis sekve de mi.”

“Mi ne kredas, eĉ unu vorton. Kion vi faris?”

“Ho, nenion gravan,—krom mortigi la urson.”

Krioj de “Friponaĵo!” “Ne kredas tion!” “Kie estas la urso?”

“Se vi deziras vidi la urson, vi devos iri en la arbaron. Mi ne povis senhelpe porti ĝin.”

Konvinkinte la domulojn ke io neordinara estis okazinta, kaj incitante iom malfruan timon je kelkaj el ili, rilate mian propran sendanĝeron, mi malsupreniris en la valon, por helpantoj. La fama ursoĉasisto kiu administras la someran pension, akceptis mian rakonton kun nekredema rideto; kaj la nekredemeco disvastiĝis inter la ceteraj loĝantoj, kaj inter la pensionuloj, tuj kiam la rakonto estis ripetita. Tamen, ĉar mi serioze insistis,

kaj oferis alkonduki ilin al la urso, kolekto el kvardek, aŭ kvindek personoj fine ekmovis kun mi por enporti la urson. Neniu kredis ke estas iu urso en la afero; sed ĉiu kiu povis havigi en si pafilon, portis unu: kaj ni eniris la arbaron, armitaj per pafiloj, pistoloj, fojnoforkoj, kaj bastonoj, kontraŭ ĉia okazontaĵo aŭ surprizo,—amaso elfarita precipe el mokemuloj kaj nekredantuloj.

Sed kiam mi alkondukis al la fatala loko, kaj montris la urson, kuŝantan paceme envolvata per sia propra felo, io simila al teruro ekkaptis la pensionulojn, kaj vera ekscito la enlogantojn. Ĝi estis sendube urso! kaj la heroo de la batalo—nu, mi ne insistos pri tio. Sed, kia procesio estis tiu, portante hejmen la urson! kaj kia aŭdantaro rapide kolektiĝis en la valo, por vidi la urson! Nia plej elokventa predikisto neniam allogis, dimanĉe, tian kongregacion.

Kaj mi devas diri, ke miaj specialaj amikoj, kiuj estis ĉasistoj, sin kondukis tre bone, entute. Ili ne neis ke estas urso, kvankam ili diris ke ĝi estas malgranda, rilate ursojn. Sinjoro Deane, kiu estas egale lerta per kuglopafilo kaj fiŝkaptilo, konsentis ke estis tre boneta trafo. Li kredeble estas la plej bonega salmokaptisto en Usono, kaj li estas egale bonega ĉasisto. Mi supozas ke neniu persono en Ameriko, pli multe deziras mortigi alkon, ol li. Sed li senbezzone rimarkis, post kiam li ekzamenis la vundon de la urso, ke li estis vidinta tian trafon, faritan de la korno de bovino.

Tia babilado tute ne efikis min. Kiam mi ekdormis, tiun nokton, mia lasta dolĉa penso estis, “Mi estas mortiginta urson!”

Tradukita de

D-ro C. H. Fessenden.



## “MI REKOMPENCOS”

Originala novelo de John L. Stanyan  
(Speciale verkita por Amerika Esperantisto)

### Ĉapitro VI

En la daŭro de tri jaroj Georgo kaj lia edzino estis tre feliĉaj. La bonfarantino de Georgo mortis, kaj ĉiom da ŝiaj posedaĵoj nun estas la liaj. Konsekvence, li estas unu el la plej riĉaj homoj en la urbego. Mario estis ideala kunestulino, edzino, kaj dommastrino, sed samtempe ekzistis fonto de malkontento al Georgo tial, ĉar ŝi havis nenian inklinon pri literaturajoj, dum libroj kaj liaj verkaĵoj estas la plej ĝuataj aferoj liaj. Laŭgrade ili kvazaŭ fremdiĝis, kaj finfine ili renkontiĝis nur ĉe la manĝotablo.

Iun tagon Georgo iris al librovendejo por aĉeti “Wilhelm Meisters Lerbjare” por ke li povu studi la kritikajojn pri “Hamleto.” La vendisto havis nur unu ekzempleron, kiun Georgo tuj aĉetis. Baldaŭ post tio, eniris la butikon du lukse vestitaj virinoj—patrino kaj filino. La filino demandis pri la sama libro. Oni sciigis al ŝi, ke ne plu restas ekzemplero de tiu libro. Sed, oni povos havigi unu al ŝi post unu monato. Maltrankvileme ŝi diris, ke ŝi ne volas atendi dum tia longa tempo; tial ŝi serĉos aliloke.

Kenriĝ alproksimiĝis la virinojn, kaj afable diris, ke li volonte pruntedonos la de li jus aĉetitan ekzempleron. La virinoj kore dankis al li, post kiam la vendisto estis konatiginta la interparolantojn. Baldaŭ Kenriĝ kaj Fraŭlino Kenvort ĝuis ĉarman konversacion, uzante la germanan lingvon, dum la patrino trarigardis kelkajn aliajn librojn pli malantaŭe en la butiko. Kiel kontenta kaj feliĉa estis Georgo pro tio, ke li estis renkontinta junulinon tiel bone instruitan; unu, kiu komprenis ion krom brodajoj, vestaron, ktp. “Jen,” li pensis, “fraŭlino havanta saman literaturan guston, kian mi havas. Pro kio Mario ne estas simila al ŝi?”

“Certe, Sinjoro Kenriĝ,” diris Fraŭlino Kenvort, “mi vin dankas pro pruntedono de tiu ĉi libro. Kien mi sendos ĝin post kiam mi ĝin estos leginta?”

“Al tiu ĉi loko,” li respondis, preninte la libron el ŝia mano, kaj skri-

bante sian nomon kaj adreson sur unu el la kromfolioj. “Mi estas ja feliĉa, se mi faras iun servon al vi, Mario—ho, pardonon—mi estis pensanta pri mia edzino; ŝia nomo estas Mario.”

“Bela nomo; tre belsona nomo.”

“Kaj ankaŭ ŝi estas tre bela virino; sed, ho ve, ŝi ne ŝatas librojn—havas neniun guston pri literaturajoj—same kiel vi!”

Sinjorino Kenvort alproksimiĝis, kaj post ne longe, la du virinoj eliris el la vendejo, la filino portante la libron. Venis en la kapo de Kenriĝ, “Tiu fraŭlino estas mia similtensemulo,” kaj li decidis, ke li rerenkontos ŝin, se tio iel ebligos al li.

Post malmultaj tagoj li ricevis de Fraŭlino Kenvort letereton, kune kun la pruntedonita libro. Leginte la kelkajn liniojn, li kuraĝis skribi al ŝi. Tion li tuj faris. Kia letero ĝi estis! Nur poeto, nur naskita amanto povas skribi tian.

“Mia kara amikino:—La libron mi jus ricevis. Kiel strangajo estas, ke vi kaj mi interesiĝas pri la sama libro, kaj pri la samaj temoj. Io en mia koro diras al mi, ke ne hazarde ni renkontiĝis! laŭ mia opinio, estis pro la sorto. Via aspekto al mi estas kiel la dolĉplena spireto de printempo, vekante la florojn en la kampo. Mi ne povas skribi al vi, ĉion, kio kuŝas en mia koro. Kiam vi permesus al mi vin denove renkonti? Kiam vi min permesos aŭskulti vian dolĉan voĉon? Mario, mia edzino, ja estas tre kara al mi, sed vi jam havas loketon varman en mia koro, tian ŝi neniam povus posedi. Per la leĝo mi estas alligita al ŝi; sed, vi estas mia nura anĝelo. Niaj animoj ne aŭskultu al la homfaritaj leĝoj. Permesu al mi, petu de vi vian amon. La morto eble iam apartigos Marion kaj min—tiam vi fariĝos mia edzino. Ne mortigu mian amon al vi. Io en viaj okuloj, dum ni estis en la librovendejo, montris al mi, ke eble ne vane mi petos pri via amo. Ho, se mi povus—ha, mi! Kiam mi povos vin denove vidi?”

“Ĉiam via,

“G. K.”



La sekvantan tagon li ricevis respondon al tiu eksterordinara letero kaj la de li senditan leteron. Sed, la skribinto ne estas Fraŭlino Kenvort; ties patrino skribis ĝin. Sinjorino Kenvort estis virino je malmultaj vortoj—kiam okazo tion bezonis—kaj sur nur unu paĝo ŝi sukcesis komprenigi tre klare siajn ideojn. Ŝi sciigis al Kenriĝ, ke laŭ ŝia opinio li estas kanajlo tial, ĉar li uzis okazon kaŭzitan de libropruntadono skribi tian abomenan, insultigan leteron al ŝia filino. Ŝi avertis al li, ke li neniam ripetu la insulton; plu ol tio, ŝi malpermesis ke li iam refoje parolu eĉ unu vorton al la filino.

Leginte tiun leteron, li disŝiris ĝin, kaj la restaĵon li enjetis en la fajrejon. Nezorgeme, li lasis la de li skribitan leteron sur la tablo. Li leviĝis, surmetis la ĉapelon, kaj ekstereniris por ĉevalpromeni.

Dum la posttagmezo, laŭ sia kutimo, Mario eniris la libroĉambron portante bukedon, kaj komencis rearanĝi la librojn kaj paperojn. Estis fatala momento, en kiu ŝi ekvidis la leteron skribitan de ŝia edzo la hieraŭan tagon. Kvazaŭ buloj de fajro vidiĝis antaŭ ŝiaj okuloj dum ŝi legis tiun leteron. Ŝi preskaŭ svenis. La sunradioj eniĝis la ĉambron, kaj la kaniro je la apuda fenestro kantis sian belan kanton, kvazaŭ mokante ŝin en ŝia malfeliĉeco.

“Kio estas tiu ĉi virino,” ŝi laŭte kriis, timigata de ŝia propra voĉo. “Mi estas lia edzino, sed li skribis, ke mi neniam povos posedi tian lokon en lia koro kian tiu ĉi—virinaĉo! Georgo mia! Mi adoris vin kiel mian amatan edzon, kaj nun—jen, vi petegas por la amo de alia, de mi nekonata virino! Dio, kompatu min—min helpu!”

Ŝi preskaŭ ŝtoniĝis tuj kiam ŝi plene komprenis la signifon de la letero. La larmoj ne elfluis, kvankam ŝia koro preskaŭ rompiĝis. En tiaj okazoj de malfeliĉeco, mortigantoj kaj memmortigantoj naskiĝas. Ŝi eltiris tirkeston kaj el ĝi ŝi elprenis revolveron. Ŝi rememoris linion de iu poeto—“Forpasos nur momento, kaj ĉio ĉi tio finiĝos.”

Tiujn vortojn ŝi nun tute komprenas, dum ŝi pretigas la ĉanon por sin mortpafi. Ŝi celis sian tempion, kaj la muskeloj de la montra fingro jam rigidiĝis. La kaniro denove komencis kanton, kies notoj sonis kiel kriegoj de diablo. La ĉano falis; estis laŭta bruo—rompiĝo de vitro, kaj ŝi falis senkonscie sur la plankon. La

birdo subite finis sian kanton — la kanto kiu estis savinta al Mario la vivon. La kuglo traboris vivampleksan portreton de ŝia edzo, kaj fordisŝirinte la manon, ĝi trafis grandan spegulon, kies pecetoj disjetigis ĉirkaŭe.

### Ĉapitro VII

Du horojn poste, kiam Kenriĝ revenis de sia ĉevalpromeno, lia edzino ne plu estas en la domo. Li rapidis al la ĉevalejo kie oni sciigis al li, ke lia edzino antaŭ du horoj rapide forajdis. Li revenis domen, kaj rekte iris en la librejon. Tio, kio unue altiris lian atenton estis revolvero kuŝanta sur la planko. Ekzameninte la pafilon li sciigis, ke unu kuglo estis forpafita, kaj tiam liaj okuloj ekvidis la disrompitan spegulon. En unu momento ĉio klariĝas al li; tie sur la tablo estas lia letero—tiu, kiun li skribis al Louizino. Nedubeble Mario estis leginta la leteron, kaj poste ekpensis sin mortigi! Li preskaŭ duonkonscie falis en seĝon. Li ĉirkaŭenrigardis, kaj post nelonga tempospaco li notis, ke la pafita kuglo estis detruinta la dekstran manon en la portreto; tiu mano lia, per kiu li skribis tiujn amplenajn vortojn al alia virino. Ankaŭ la spegulo estis detruita—tiel same kiel lia hejmo!

Post sia sinreregado, li kuregis al la ĉevalejo, seligis ĉevalon, konatigis al la ĉevalisto, ke eble li tiun nokton ne hejmen revenos, kaj forajdis kiel frenezulo. “Mario,” li pensis al si, “certe reiras al ŝia gepatra domo,” kaj tiuloken li direktis la ĉevalon.

Ĉirkaŭ la meznokto li eniris la bienon kiun li tiel bone konas. Tie ĉi ja estas la kampoj kie li kaj Mario—jam infanoj—kolektis florojn; tie sur monteto sidas la lernejo; tie nemalproksime estas la roko sur kiu ili enamiĝis. Kaj tie estas la domo; ŝia fenestro. Larmoj de malespero plenigis liajn okulojn. Tenante la kondukiĵojn per la maldekstra mano, li levis la dekstran por forviŝi la larmojn. Subite sonis ekpafo sekvata de eho—li sentis pikdoloron en ŝia levita mano. Li falis de sur la ĉevalo, dum la besto eksaltis flanken.

\*\*\*\*\*

Antaŭ kelkaj horoj, dum la Dekster' familio kune sidis en la librejo, oni klare aŭdis frapojn de ĉevalhufoj rapide alproksimiĝantaj la domon. Sinjorino Dekster kuris al la fenestro ĝuste kiam ĉevalo kaj ĝia rajdanto envenis la korton. Rekoninte Mario'n la patrino preskaŭ svenis pro timo.



"Kio estas tiu?" demandis Sinjoro Dekster.

"Iu tien ĉi venas," ŝi subvoĉe aŭdigis.

"Mi ja scias, ke iu venas! Mi havas orelojn! Kiu venas?"

"Edzo," malrapide diris la patrino, "Mario venas."

La patro salte leviĝis, samtempe elpuŝante blasfemajon. "Tiu filinaĉo ne povas eniri mian domon! Ĉu vi min aŭdas? Si amforkuris—la diablo ŝin prenu! Nia Mario estas mortinta. Si mortis tiun nokton kiam ŝi malhonorigis ĉiun el ni. Mia malbeno restu sur ŝia kapo. Si ne povas eniri mian domon—neniam!"

"Edzo, ŝi estas nia filino; nia karno kaj sango, kaj tute egale estas, kion ŝi estas farinta. Si revenas, kaj ja estas nia devo gepatrece akcepti ŝin. Ambaŭ ni—iun tagon—eble petegos pardonon, kaj ĝin ne ricevos—eble estos tro malfrue!"

"Al kiu mi iam petegos pardonon?" kolereme demandis Sinjoro Dekster.

"Al la ĉiopova Dio!" varmege respondis ŝi.

Sonoris mallaŭta fingrofrapo sur la malantaŭa pordo. Ĝin malfermis Sinjorino Dekster, kaj Mario preskaŭ enfalis la ĉambron.

"Mia kompatinda filino!" ekkriis la patrino. "Mario! Kio okazis? Parolu al mi?"

Dum ili ambaŭ paŝis en la librejon, Mario ekparolas.

"Ho, patrino mia—patro—pardonu al mi mian pekon—pardonon mi petas. Ne nur por mi mem mi petegas, sed—kaj ne por mia edzo; edzon mi ne havas! Permesu, ke mi restu ĉi tie nelongan tempon—ne povos esti longa. Ho, patrino mia, patrino mia! Patro, ĉu vi ne pardonos? Mi restu mallongan tempon!"

"Vi inferidino, maldankema filinaĉo," siblis la kolera patro; "tie estas la pordo—tuj forlasu por ĉiam mian domon! Neniu edzo? Belan dancon vi dancadis dum la pasintaj tri jaroj! Kie estas via amanto? Kie li estas? Ambaŭ vi estu malbenataj! Foriru!"

Mario kuris al la patro prenante lian manon. "Patro," ŝi ekscitite kriis, "mi bone scias, ke mi malbonagis, sed spite de tio,—je la nomo de Dio—ne forpelu min. Dio mia! Ĉu vi ne povas vidi, ke—mi ne estas sola. Patrino, certe vi komprenas! Rigardu min! Permesu ke mi restu mallongan tempon."

Si falis plankon ĉe la piedoj patraj. Elpuŝante blasfemajon li pugno-

frapis la filinon, kaj ŝi sterniĝis kvazaŭ mortigite. Kiel tigrino la patrino eksaltis al la edzo, kaj ŝi puŝegis lin en iun seĝon.

"Besto vi estas! Ĉu vi forgesas, ke vi estas ŝia patro? Se jes, ne forgesu, ke mi estas ŝia patrino. Sovagbestoj batalas por siaj idoj—mi batalas por mia. Honto al vi! Honto! Kia domaĝo estas, ke mi estas la edzino de tia bruto kia vi! Eble Mario nebone agis; se tio estas ja fakto, tiom pli ni devus pardoni, kaj ami ŝin. De kiam vi fariĝis sanktulo? Ha, ha! Sajnas, vi tute forgesas kiamaniere vi trompis min kiam mi ankoraŭ estis junulino!"

Dum la patrino diris tiujn vortojn, ŝi karese levis Mario'n kaj forviŝis la sangan de sur la buŝo de l' filino. "Karulo," ŝi diris, "via patrino ankoraŭ amas vin, kaj ŝirmos vin je sia propra vivo, se tio estus necese. Venu kun mi!" kaj ambaŭ iris en apudan ĉambron.

Sinjoro Dekster estis vekata el sia mortsimila letargio per la enirkuro de sia filo, Franko.

"Je la nomo de Dio," ekkriis tiu ĉi, "rapidu kun mi! Senrajdata ĉevalo jus pretertrojis min—io okazis!"

La patro apenaŭ ne aŭdis la filon. Franko kuris al sia patro, kaj forte skuis lin. "Patro!" li denove kriis, "ĉu vi ne aŭdas min? Io eksterordinara okazis!"

Franko sukcesis helpi sian patron sur liajn piedojn, kaj kvazaŭ eltiregis lin al la ankoraŭ malfermita pordo. Depreninte la patran ĉapelon for de hoko li surmetis ĝin sur lian kapon, kaj ambaŭ malaperis en la mallumecon.

La malvarmeta nokta aero estis kiel kuracilo al Sinjoro Dekster, kaj baldaŭ li tute konsciis pri la afero. Li ekdemandis al sia filo pri tio, kio okazis.

"Neniun vorton nuntempe!" estis ĉio, kion respondis la filo.

Post nelonge ili trovis, apud la piedvojeton laŭlonge la landavojo, vunditan viron, kaj ambaŭ tuj rekonis la vizagon de Georgo Kenriĝ.

"Diablo! Vi! Kiamaniere vi alvenis tien ĉi? Kio okazis?" spirege demandis Sinjoro Dekster.

"Oni pafis al mi," estis la respondo. La parolinto iom suprenlevis sian dekstran manon, kiu estis senforma aro de ostoj kaj disŝirita karno, vidiĝante kadavrecan aspekton en la pala lunlumo.

"Damage estas, ke ne estas via



kapo," siblis Sinjoro Dekster. "Tio estas justa rekompenco al vi por via forrabo de mia filino, vi kanajlo."

"Patro," simpatieme interrompis Franko, "la viro ja estas terure vundita. Ni ne estu tro severa kontraŭ li. Helpu min alporti lin al la domo."

Kenriĝ, malfortigite pro la perdo de sango, estis alportata al la domo. Oni venigis kuraciston kiu, post diagnozo, decidis ke estas nepre necese fortranĉu la vunditan manon. Post kiam Kenriĝ eliris el sub la influo de l' etero, li fariĝis frenezema, kaj patose blekis, "Mario! Mario! La dekstra mano! Tiu malbenita mano! Vi ĝin forpafis! Vi mem ĝin forpafis! Ha, ha! Karulo mia, pro kio mi devus pardoni vin?"

Trankviligilojn oni donis al li, kaj post nelonge li ekdormis.

Dum ĉio tio ĉi okazis, Sinjorino Dekster kaj Mario estis en iu duetaĝa ĉambro. Franko paŝis ĉirkaŭe la librejon. La patro prenis la pafilon de Franko, kaj atente rigardadis ĝin.

"Ĉu ĝi ankoraŭ estas ŝargata?"

"Unu tubo estas malplena," diris Franko.

"Unu tubo ŝargita," siblis Sinjoro Dekster. "Mia filo, diru al mi—ĉu vi—intence—?"

"Ŝ-ŝ-ŝŝŝ! Patro, dank' al Dio, li ne mortos! Sed, mi malamegas lin, ne nur ĉar li kunforkuris kun mia fratino, sed ankaŭ pro tio, ke li pugnofrapis min. Tiutempe mi certigis al li, ke li iam kare pagus pro tiu ago—kaj, li do pagis!"

"Mia Dio, knabo! Ĉu vi efektive komprenas kion vi diras? Vi preskaŭ fariĝis mortiganto. Parolu pli mallaŭte."

La vundita denove duonvekiĝis. "Mario," li frenezeme diris, "Mario ĝin forpafis! Ha, ha, ha! Sed, ŝi ja

havis bonan kialon. Vi! Vi! Kiuj vi estas? Neniam, mi petegas al vi, neniam unu parolon al iu ajn persono pri tio, kion mi ĵus diris—promesu al mi! La saman manon ŝi forpafis la hieraŭan posttagmezon," kaj li ree ekdormiĝis.

\* \* \* \* \*

Patro kaj filo dum kelkaj minutoj diris nenion; ili profunde pensadis. La patro unue rompis la silenton.

"Franko, via fratino hejmenvenis."

"Mario?"

"Jes."

"Kie ŝi nun estas?"

"Supre—en la patrino ĉambro. Ŝi ne bone sanas. Pli bone estus, se vi ne renkontus ŝin ĉi tiun nokton." Forpasis kelkaj minutoj. Tiam diris la patro: "Eble estus bone, se vi alvokus vian patrino por ke ŝi sciigu pri la vundita viro tie. Ne estas iu bona kialo pro kio ni devus prokrasti ĝis morgaŭ."

"Patro," serioze petis Franko, "certe vi nenion diros al ŝi pri ĉi tio!"

"Tute ne!"

Franko frapis sur la pordo de l' patrino ĉambro, sed aŭdiĝis neniu respondo. Li malfermis senbrue la pordon. Troviĝis neniu interne. Li kuris malsupren, preskaŭ falis en la librejon, kaj kriis al la patro.

"Nek Mario nek la patrino estas en ĉi ties ĉambro! Kaj la lito estas netuŝita!"

"Ili ne estas en la ĉambro?"

"Neniu estas en la ĉambro!"

Patro kaj filo traserĉis la tutan domon, sed ne trovis aŭ Sinjorino Dekster'on, aŭ Mario'n. Ili ja forestis—ĉapeloj, vestaro, kaj ĉio estas for. Eĉ la el ebena farita monskatoleto estis for.

(Daŭrigota)

---

"Kiel vi scias ke li estas fremdulo?"

"Nu, li tiel ĝuste parolas angle: kaj povas kanti la tutan 'Stelornamita Standardo.' Neniu naskita amerikano povas fari tion."

—Chicago News.

---

Edno—Sro. Wilkins estas terura mensogulo, ĉu ne?

Gracio—Ne. Ne ĉiam. Li diris ion tre ĉarman al mi hieraŭ vespere.

—Somerville Journal.





## LA VAGANTOJ

Kontrakto estas donita al kompanio por prepari du mejlojn de akvotubo, formante unu parton de la akvoproviza sistemo en la urbo Nov-Jorko. La tubo konsistos el 825 partoj, ĉiu proksimume 12 futojn longa kaj neniu el la partoj ĝuste rekta pro la malebena marfundo.

Fremduloj de ia nacio estas nepopularaj en Meksiklando. La Anglujanoj kaj Amerikanoj estas treege malamataj de la pli malaltaj klasoj. Tipa Meksikano el ĉi tiu klaso estas malgranda viro, nigrohara, kuprokolora, kun elstarantaj vangostoj same kiel la Amerika Indiano. Lia ĉefa okupado estas dormado, kaj lia plej alta celo estas vetludi kaj amindumi.

Planoj por la observado de "Virinotago" de la laborantaj virinoj de St. Peterburgo, Rusujo, estas tute rompita de la policanoj. Oni intencis festi ĉefe per lekcionoj pri aferoj kiuj influas la laboron kaj pozicion de virinoj. La policanoj arestis multajn virinojn antaŭ la nomita tago, kelkaj el ili apartenante al la bone instruitaj klasoj, kaj malpermesis ĉiujn kunvenojn escepte unu. Tamen, tri parolantinoj por ĉi tiu kunveno estis arestitaj antaŭ la tago alvenis, kaj la kunveno finiĝis post nur du virinoj parolis. La ĉeestantaro penis formi procesion ĉe la fino, sed ĉi tiu estis ankaŭ tute rompita kaj okazis pluaj arestoj.

## LA BATALO DE LA FORMIKOJ de Henry D. Thoreau

**U**NU tagon kiam mi aliris al mia lignajejo—aŭ, pli korekte, al mia amaso da arbustumpoj—mi rimarkis du grandajn formikojn, unu ruĝa, la cetera nigra, kiuj furioze batalis unu kontraŭ la alian. La nigra formiko estis la pli granda el la du, havante preskaŭ duoncolon da longeco. Premkaptinte unu la alian, ili ne malligis la tenadon, sed senhalte baraktadis, kaj ĉirkaŭrulis sin sur la lignajetoj.

Pli malproksimen rigardante, mi vidis ke ĉiuj el la lignajetoj estis kovritaj per tiaj batalantoj; ke jen ne estas duelo sed milito, milito inter du formikidaroj, la ruĝajn ĉiam kontraŭbatalantajn la nigrajn, kaj ofte je du ruĝuloj po unu nigrulo.

La legioj de ĉi tiuj mirmidonoj troviĝis sur ĉiuj el la montetoj kaj

en ĉiuj el la valetoj en mia lignajejo, kaj la tero jam estis kovrita per la mortigitoj kaj la mortigantoj, kaj el la ruĝuloj kaj el la nigruloj. Ĉiufanke ili sin intermiksas je mortiga batalado, tamen sen ia bruo tia kiam mi povus aŭdi, kaj homaj soldatoj neniam interbataladis tiel firmintencite.

En malgranda, sunrava valetoj inter la lignajetoj mi rigardis du kiuj estis firme kunligitaj unu kun la alia, jen je la meztago, pretaj ambaŭ batali ĝis kiam la suno subiros aŭ la vivo eliros. La pli malgranda ruĝa probatalanto estis liginta sin, simile al ŝraŭbtenilo, al la antaŭaĵo de sia malamiko, kaj dum la tuta baraktado sur tiu batalkampoj li neniam eĉ momente ĉesis mordetadi je unu el la antenoj de la nigrulo, jam formordetinte la ceteran. Dume la nigrulo ĉirkaŭjetis lin de flanko flanken, kaj mi rimarkis, pli proksime rigardante, ke jam li estis



seniginta sian kontraŭulon je kelkaj membroj. Je la persisteco de dogoj ili interbatalis, nek unu nek la alia montrante ian inklinon forkuri. Evidente estis ke ilia batalkrio estas—Venku aŭ mortu.

Dume alproksimiĝis unu ruĝa formiko, laŭ la monteflanko de ĉi tiu valetto, verŝajne multe ekscitite, kiu aŭ jam estis mortiginta sian malamikon aŭ ankoraŭ ne estis partopreninta en la batalo—sendube ne—unu kies patrino, kredeble, estis dirinta—Revenu aŭ portante vian ŝildon aŭ portate sur ĝi. Aŭ eble li estis iu Ahilo kiu estis nutrita sian koleron aparte, kaj kiu nun venis por venĝi aŭ savi sian Patroklon.

De malproksime li vidis ĉi tiun malgalan batalon—ĉar la nigruloj estis duoble pli grandaj ol la ruĝuloj—kaj rapide li alproksimiĝis ĝis li staris gardeme je duoncolo distance de la batalantoj. Tiam, atendinte ĝustokaze, li saltis sur la dorson de la nigra militisto kaj komencis operacii ĉe la radiko de la dekstra kruro de tiu, permesante la malamikon elekti laŭvole inter liaj propraj membroj. Kaj nun jen tri kiuj estis kunligitaj sin por la dumvivo, kvazaŭ ia nova speco de altireco estis elpensita, speco kiu nuligus ĉiujn aliajn ŝlosilojn kaj cementojn.

Mi ne estus surprizita je tiu tempo se mi estus eltrovinta ke tiuj batalantoj havas siajn respektivajn muzikbandojn starantajn sur altaj lignajetoj, ludantaj siajn naciajn himnojn por ekscitigi la malviglulojn kaj por kuraĝigi la mortigantajn militistojn.

Eĉ mi mem estis iome ekscitita, kvazaŭ ili estis viroj. Ju pli vi pripensas la aferon des malpli la diferenco. Kaj certe ne troviĝas en la historio de mia urbeto, Concord—se ja en la historio de Ameriko—raporto pri iu batalo, kiu komparas kun ĉi tiu, ĉu laŭ la nombroj kiuj partoprenis ĉu laŭ la patriotismo kaj heroismo vidiĝitaj. Laŭnombre kaj laŭ la buĉado ĝi estis alia Aŭsterlitzo aŭ Dresdeno. La batalo de Concord! En tiu du mortigitaj inter la patriotoj kaj unu, Luther Blanchard, vundita! Ĉi tie ĉiu formiko estis kvazaŭ Buttrick, tiu kiu ekkriis—“Pafu! Pro la amo de Dio, pafu!” Kaj jen milojn tuŝis la sorto

de Davis kaj Hosmer, la du patriotoj kiuj falis mortigitaj.

Ĉi tie ne troviĝis eĉ unu dungito. Mi ne dubas ke ili batalis pro principo, same kiel niaj prapatroj, tamen ne kiel ili, por eviti tripencan imposton je teo; kaj mi ne dubas ke la rezultatoj de ĉi tiu batalo estos tiel gravaj kaj memorindaj je tiuj kiujn ĝi tuŝas, kiel la rezultatoj de la batalo de Bunker Hill por ni.

Mi prenis la lignajeton sur kiu bataladis la tri kiujn mi speciale prikskribis, enportis ĝin en mian domon, kaj metis ĝin sub glaso sur la fenestreto, por ke mi povu vidi la rezulton de la batalo.

Per mikroskopo mi povis vidi ke la unua ruĝa formiko diligente mordetadis je la antaŭa kruro de sia malamiko, jam fortireginte la ceteran antenon, sed lia propra brusto estis tute fordesirita tiel ke tiuj vivigaj organoj kiuj tie troviĝis estis malkovritaj je la buŝego de la nigra militisto kies brustarmajo estis, verŝajne, tiel dika ke li ne povis ĝin trapiki. La nigretaj karbunkloj de la okuloj de la suferanto brilis je furiozeco tia kian nur la milito povas ekscitigi.

Dum plia horo ili interbaraktadis sub la glaso, kaj kiam mi ree rigardis, la nigra soldato estis formordinta de la korpoj la kapojn de siaj kontraŭuloj, kaj la ankoraŭ vivhavaj kapoj pendis je liaj flankoj, kvazaŭaj trofeoj ĉe lia selo. Firme kunligitaj ili estis, kaj per malfortaj penoj—ĉar li estis sen antenoj, restis nur parto de kruro, kaj kiom da alispecaj vundoj li havis mi ne sciis—li estis klopdanta sin liberigi de ili. Post duonhoro li sukcesis; mi forprenis la glason, kaj for de la fenestreto li iris, tiel kripligite. Ĉu li postvivis tiun bataladon kaj restadis dum siaj postaj tagoj en iu Hospitalo por Vunditoj mi ne scias, sed mi pensis ke lia industrikapableco ne multe valoros post tiu bataltago.

Mi neniam ellernis kiu partio venkis, nek la kaŭzon de la milito, sed dum la resto de tiu tago mi sentis kvazaŭ mi estis ekscitita kaj korsirita per la rigardado al la terureco kaj buĉado de homa batalo antaŭ mia pordo.

El “WALDEN” tradukis ESTO



Order Blank (For New Subscribers only)

PLEASE WRITE NAME AND ADDRESS WITH EXTREME CARE. In remitting, it is quite safe to send a dollar bill and 50 one-cent stamps, or a coin if well wrapped. We accept one-cent stamps for any small amount.

SUBSCRIPTION ORDER

American Esperantist Company,

I enclose \$1.50, for which mail to my address one cloth-bound copy of The American Esperanto Book, and Amerika Esperantisto one year.

Name	Street, Route
<hr/>	
City	State

Sino. Tripler—Mia edzo estas treege nezorga.

Sino. Rippler—Kiel?

Sino. T.—Nu, li opiniis ke la materialo por mia nova jupo estas kulovualo kaj li alnajletis ĝin al la fenestroj. —Judge.

LA DIFERENCO

Vilĉjo—Paĉjo, kio estas la diferenco inter la genio kaj la talento?

Paĉjo—Talento ricevas monpagon ĉiusabate, mia filo.

ENROLLMENT BLANK

Dr. B. K. Simonek,  
1669 Blue Island Ave.,  
Chicago.

I wish to join the 7th National Esperanto Congress and send here-with the following fees:

(Mark fund or funds to which you wish to subscribe).

- EANA Membership Card . . . \$50
- Congress Ticket . . . . . \$5.00
- Guaranty Fund . . . . . \$5.00

Name.....  
Address.....  
.....  
Date.....

THE ESPERANTO KEY

(American Edition)

The most inexpensive, most valuable, and most efficient propagandilo on the market.

Send 2c for sample


- 25 for 25c
- 100 for \$1.00

THE  
AMERICAN ESPERANTIST CO.  
Incorporated  
West Newton, Mass.



**THE NOVITAS  
POCKET LIGHTER**

Patent applied for



Full size with  
cover removed

Without doubt the cleverest device of its kind ever invented. A miniature pocket lamp—handy — safe — always ready — economical. Simplicity itself — no complicated mechanism — automatic feed to sparking metal.

Turn the wheel;  
It lights the wick.

Smallest pocket lighter ever made, weighing only 1-2 ounce. Fits vest pocket. Extra refills only 5 cents. Invaluable to smokers—to everybody. Handsomely nickel plated and polished.

**PRICE 25 CENTS**

**FOR SOUVENIR AND PRESENTATION PURPOSES**


as well as for the Holiday Trade, we make a special style of the NOVITAS POCKET LIGHTER in

**HEAVY QUADRUPLE SILVER  
PLATE**

**PRICE 50 CENTS**

ANY OF THE ARTICLES ADVERTISED SENT POSTPAID ON RECEIPT OF PRICE.

**THE MAGIC  
HOUSEHOLD LIGHTER  
PRICE 25 CENTS**



Full Size

Enormous manufacturing facilities have made it possible for us to establish a retail price of 25 cents.

Extra Refills—mounted on brass screws—5 cents.

Samples sent prepaid on receipt of price.

No unsightly charred matchsticks to annoy the housewife.

Thousands of lights without refilling.

A beautifully nicked and polished reservoir, containing absorbent cotton which is saturated with gasoline. (One filling lasts several months.) A lighting rod with asbestos tip is provided with Novitas Sparking Metal. Draw this quickly down the file—

**ZIPP—IT LIGHTS.** That's all. Superior to any Wall Lighting Device heretofore invented.


**MODOC SALES CO.**

WEST NEWTON, MASS., U. S. A.

When writing to advertisers please mention AMERIKA ESPERANTISTO



## NOVITAS GAS LIGHTER



### Half Size

We have perfected a Household Gas Lighter, which we believe to be superior to any heretofore made. It is constructed on the same principle as our Novitas Pocket Lighter; uses very little sparking metal; is quick and dependable; and above all is simple. The accompanying illustration shows its action. A "twist of the thumb" against the corrugated wheel in the handle, and hundreds of little sparks appear at once. These sparks instantly ignite any gas jet.

It is useful in the kitchen for igniting the gas stove, invaluable throughout the house, and is furthermore of special importance to all automobile owners in lighting the acetylene lamps on their cars.

The Sparking Metal itself is adjustable by means of a small screw at the side of the Lighter, and a single piece of it will last many, many months.

Extra Refills may be had at 5c each, our Refills being of the very highest grade, unaffected by moisture.

Each Lighter is neatly boxed.

PRICE 25 CENTS

## THE "STORM" LIGHTER



A little contrivance, built on the general lines of the world-renowned Novitas Pocket Lighter, which will light a cigar or pipe in the fiercest storm.

Its construction is simple indeed—its action still more so. A tube carrying a wick—a hardened steel igniting wheel—a piece of Novitas Sparking Metal—that's all.

Pull out the wick, turn the wheel, flash—the wick lights. It will not give a bright flame, but burns slowly, like the tinder of our forefathers.

Draw the wick back into the case—out goes the light.

Extra wicks and extra refills are supplied at 5 cents each. Every Lighter comes ready for use, with two wicks; the Sparking Metal itself giving thousands of lights.

PRICE 25 CENTS


# MODOC SALES CO.

WEST NEWTON, MASS., U. S. A.

When writing to advertisers please mention AMERIKA ESPERANTISTO



## A NEW PENCIL SHARPENER



During the past few years, many complicated devices have been manufactured which sharpen a pencil perfectly, but which cost anywhere from \$1.00 to \$6.00 each.

Of the cheaper kind, which may almost be guaranteed to "rasp the wood and break the lead," there are hundreds on the market.

It has remained for us to perfect a unique pencil sharpener, based upon the scientific principle of the carpenter's plane, which will properly cut the wood and at the same time produce a perfect point, without breaking the lead.

However, instead of passing the plane over the wood, the Pencil Sharpener is firmly held (as per the illustration herewith) near the edge of a table or desk, and the pencil itself is drawn against the hardened steel cutting edge, producing either a long or a short bevel.

The blade has a cutting edge at each end so that after the first edge becomes dull, the second may be used. The blade is adjustable and may be easily removed from the holder for sharpening.

The Blade, or as it might be termed, the "chisel," is made of the best tool steel, scientifically hardened and tempered.

This Unique Pencil Sharpener will find a place upon the desk of every Business Man, and will be eagerly welcomed by everybody. Its action is so simple that its good qualities must appeal to all.

Each Sharpener is neatly boxed, with directions for use.


PRICE 10 CENTS

## THE UNIQUE KNIFE SHARPENER

We offer this clever invention to the American public, feeling confident that in it we have produced an article as practical as it is unique.

Two discs of specially hardened and tempered tool steel are so arranged as to produce a double sharpening device.

Any ordinary kitchen knife or carver which has become dull may be re-sharpened in a few seconds by drawing it between the two discs. At first a little force should be used, but as the sharpening process continues, this pressure is lessened, and in a few seconds, a perfect edge results.



The Knife may also be held stationary, and the Unique Sharpener drawn along its edge, being careful not to draw it towards you, but from you.

The discs are adjustable, and any wear on them may be taken up by loosening the screws, turning the discs a fraction of an inch and then tightening the screws again. There must not be any space between the discs. One application of the Unique Sharpener saves its cost.

Each Sharpener is neatly boxed.

PRICE 10 CENTS

# MODOC SALES CO.

WEST NEWTON, MASS., U. S. A.

When writing to advertisers please mention AMERIKA ESPERANTISTO



## TENTH CONGRESS OF ESPERANTISTS

Will be held in

**PARIS, AUGUST 2 TO 8**

This will be the greatest gathering of Esperantists ever held, and, in order to secure a large attendance of Americans, special inducements will be offered by the

## NORTH GERMAN LLOYD

Express and Fast Mail steamers on Tuesdays, Thursdays and Saturdays to

**LONDON PARIS BREMEN**

You can return, if you prefer, by way of the Mediterranean, sailing from Genoa or Naples.

For detailed information address

**OELRICHS & CO., Gen. Agts.**

5 Broadway, N. Y.  
Or Local Agents

The  
Key to  
Europe



## LA ESPERO

Words and music of the Esperanto National Anthem, according to the well-known and popular air of De Menil.

25 copies for 25c

100 copies for 50c

**THE AMERICAN ESPERANTIST CO., INC.**  
West Newton, Mass.

## DEZIRAS KORESPONDI

[Unufoja anonco kostas 20c. (40 Sd.) por ĉiu linio. Kvarfoja anonco kostas 50c. (1 Sm.) por ĉiu linio. Linio enhavas proksimume 40 literojn, punktojn aŭ spacojn.]

Multaj instruistoj kaj gestudentoj volas korespondi kun ge-samideanoj en Usono kaj fremdaj landoj. Adresu: S-ro P. M. Schuyler, Estro de Lernejoj, Pickford, Mich., Usono. 6

S-ino G. H. Thornton, 309 Buffalo St., Conneaut, Ohio, I.P.K. 7

## The 1914 Edition

OF

## The Whole of Esperanto

Owing to the tremendous demand for this propaganda booklet we have been obliged to print another edition.

5c per copy 10 for 25c 50 for \$1.00

Grammar, Vocabularies and a Little Story

Have You a Copy?

—  
THE  
AMERICAN ESPERANTIST CO.  
Incorporated  
West Newton, Mass.

## THE ESPERANTO MONTHLY

An excellent elementary magazine for English-speaking Esperantists.

Specially adapted to beginners and class leaders.

One year's subscription at the nominal price of FORTY CENTS!

Special combination offer with Amerika Esperantisto for a limited time,—\$1.25.

—  
THE  
AMERICAN ESPERANTIST CO.  
Incorporated  
West Newton, Mass.

When writing to advertisers please mention AMERIKA ESPERANTISTO



# Kristnasktempa Letero

Filadelfio, Dec. 25an, 1913.

“Emerson” Fortepiano-Kompanio:

Sinjoroj:— Mi memvole skribas ĉi tiujn kelkajn liniojn por nenia celo escepte diri al vi iom pri unu el viaj fortepianoj, ekzemple:

Dum dekkvin jaroj mi riparas kaj agordigas fortepianojn, kaj mi ektrovas multajn tre malnovajn. Antaŭ kvin semajnoj, oni donis al mi unu el la viaj por kordekipi nove, kaj ree farigi ĝin ludebla. Kiam mi ekrigardis la instrumenton, ĝi ŝajnas nenio escepte maso de ŝimaĵo kaj rustaĵo, kaj estas malfacile diri kio estas al ĝi; tial mi movigis ĝin al mia laborejo. Mi elprenis la ludilaron kaj ektrovis ĉiujn feltaĵojn, risortojn, k.t.p. preskaŭ la samaj kiel novaj. Ĉiuj aksingoj estis bonegaj kaj mi nur devis enmeti novajn centrostreĉilojn kaj risortojn por la kordfrapiloj. La kordfrapiloj ankaŭ estis bonegaj post kiam mi fajlis ilin kaj la ludilaro estas tiel bona kiel nova. La agordpingloj estis en bona stato—mi nur devis elpreni la ŝimaĵon. La agordtabulo ne havas eĉ unu krevon kaj la sontabulo havis nur unu breĉeton malfermitan.

Mi volas skribi ĉi tiun ĉar tiu fortepiano havas daton 1880 kaj la numero estas 32182; ĝi nun estas finita kaj havas tonon egalan al la plej bona farata nuntempe.

Ĉi tiu estas laŭvola rekomendo, ĉar tiel plaĉas al mi la rezulto, ke mi ne povis kontraŭstari tiamaniere skribi al vi, kaj sciigi vin pri la afero,—ĝi tute superis miajn esperojn. Mi esperas ke mi renkontos pli multe da “Emerson’aj” kaj mi certe povas diri bonan vorton pri ili. Mi restas,

La via,

(subskribita) W. H. CROSSLEY.

Post tridek jaroj, la fortepianoj konstruitaj de la “Emerson” Kompanio, en la 1914a jaro, sin atestos egale bonaj.

Petu katalogon esperante

**EMERSON PIANO CO.**

Fondita 1849

BOSTON - - MASS.